



MONATA BULTENO de la Esperanta Societo "FRATECO"

INICIATINTO: S-RO IZIDORO FLORÍA - DIREKTORO: RAMÓN DE SALAS

Administracio kaj Redakelo: Str. RODA, n.º 14-16

KREDU!...

Kiam bruas la mar', kiam batas la ond',
 Kiam ĝemas ventego terura,—
 Kredu: venos la hor'—trankviliĝos la mond'
 Glata estos la maro lazura.
 Kiam premas l'anim', kiam premas dolor',
 Kiam ĉia forestas espero—
 Kredu: venos la hor'—kaj paciĝos la kor',
 Via tute foriĝos sufero!

Originale verkis.
 ROMANO FRENKEL.

LEGENDO

La blinda pafisto sur «Sonneck». (Rokkastelo: «Sunangulo»)

Ĉe la bela, meza Rejno staras—ne malproksime de "Bacharach"—la fiera kastelo "Sonneck". Kiu hodiaŭ supreniras la krutan vojeton, tiu trovas tie supre nur muskumitajn ruinojn kaj plenan solecon, kaj kiu estas meditema, tiu, rigardante la duonruiniĝintajn turojn kaj la disfalintajn halojn kaj volbojn, eble sentas la ekstremon de l' pereeco. Antaŭ multaj jarcentoj la fiera Sonneck estis unu el la plej belaj kaj plej fortikaj kasteloj apud la Rejno. Ĝiaj kortoj resonis de l' gaja bruo de la kavaliroj kaj militistoj, kiuj movigis siajn ĉevalojn kaj en gaja batalludo rompis siajn lancojn kaj bruigis la sabrojn; la haloj resonegis de l' ridado de la trinkantoj kaj de la sonegantaj kornoj, kaj bojado kaj gajsonantaj fanfaroj vekis multoblan eĥon de sur la altaj muroj kaj pordegoj, kiam la Sonneck-mastro kun siaj amikoj elrajdis por ĉasado. Se tiam la kastelo estis malplena de homoj kaj nur la paŝoj de la gardistoj sonis sur la ŝtonplatoj de l' pordegturoj, atentema aŭskultanto eble aŭdis krome aliajn sonojn elvenantajn el la profundaj kelkarceroj de la kastelo. Estis kvazaŭ ĉenoj brue skuataj, senpaciencaj paŝoj pene farataj en malvastaj arkajkeloj, kaj malbenoj kaj preĝoj supreniĝis el ĉi tiu mondo de l' teruro kaj mallumo; ĉar la Sonneck-mastro estis mal-

kompatema, kruela kavaliro, kaj en la keloj de siaj turoj suferis multaj malliberuloj, kiuj estis liaj malamikoj, kaj je kiuj li kruele venĝis. La plej kompatinda el ĉi tiuj kompatinduloj estas la Fürstenberg-mastro. Se la aliaj havis nur malmultan esperon, revidi la sunlumon, li ne havis eĉ iometan, ĉar la Sonneck-mastro igis blindigi lin. La okazon de ĉi tiu terura fifaro la popolo rakontis laŭlonge de l' Rejno timeme frustrante.

Iam la Fürstenberg-mastro estis la plej fame konata arbalest-pafisto en la tuta Rejnlando, neniam lia sago preterflugis la celon, kaj neniu alia pafisto povis fieri pri tio, ke li same, kiel la Fürstenberg-mastro povis trafi la birdon en la aero kaj mallarĝan silikbranĉon el distanco de cent paŝoj. En la kortega tendaro de Ingellheim la juna imperiestro estis laŭte admirinta lian lertecon kaj moke ridetinta pri la mizera maltrafo de la Sonneck-mastro. De post ĉi tiu momento la kruelulo malamis la felicĉan konkuranton kaj juris al li teruran venĝon. Iun tagon la Fürstenberg-mastro estis malaperinta, kaj nur malmultaj sciis, ke la malfelicĉulo en malluma nokto estis kaptata de la rajdistoj de l' malica malamiko kaj ke ĉi tiu kruelulo blindigis lin kaj ĵetis lin en la plej profundan kelon de la kastelo. La malfelicĉulo ja havis bravajn amikojn, sed neniu kuraĝis publike akuzi pro la malbonfaro la Sonneck-mastron, kies krueleco kaj arbitreco ĉie estis timata.

Iun tagon la ĉasbruego ree muĝis en la aŭtunaj arbaroj ĉirkaŭ la kastelo Sonneck. Jen du kavaliroj proksimiĝis al la ĉasestro kaj ĝentile demandis pri permeso partopreni la ĉasadon, ĉar ili en sia malproksima hejmo aŭdis multon laŭdindan pri la nobla ĉasarto de la kavaliro de Sonneck. Ĉi tiun flatparolon de la bonkondataj junuloj la kastelestro ne povis kontraŭstari. Baldaŭ ili rajdis je lia flanko kaj laŭdis kun fervora aplaŭdo ĉiujn lancojetojn kaj pafojn, kiujn la Sonneck-mastro faris. Post la finita ĉasado ili estis invitataj esti gastoj de la ĉasestro hejme en lia kastelo ĉe kantado kaj trinkado. Kaj kiam krepuskiĝis la kavaliroj fremduloj sidis gajaj kaj parolmaj mezaj inter la gajega trinkkunularo, kiun la

Sonneck-mastro en sia kastelo regalis per ĉasaĵo kaj ardiga Rejnovino.

Pli kaj pli fortiĝis la sovaĝa plezuro, pli kaj pli densa fariĝis la malklara nebulo, per kiu la ebrico ĉirkaŭis la fruntojn de la trinkemuloj. Neniu rimarkis, ke la fremdaj gastoj jam de kelka tempo ne plu multe trinkis de la vino de sia gastiganto, kaj tamen estis la plej sovaĝaj kaj plej gajaj en la ebria aro. Ili ambaŭ lerte direktis la konversacion al la pafarto, kaj tiu, kiu sidis je la flanko de la kastelestro, ridante kriis, ke tiel bone, kiel hodiaŭ lia instruisto kaj malavara mastro, la nobla kavaliro de Sonneck, certe neniam pafis la Fürtenberg-mastro, kiun bardo en lia malproksima lando iam estis nomanta la majstropafisto de l' Rejnlando.

Daŭrigota.

LA MIRINDAJ BOTOJ

(aktuala fablo)

Proksime de la maro, ĉirkaŭata de belaj ĝardenoj, densa multcentjara arbaro kaj ĉarmevidiĝaj urbetoj, ekzistas ia malgranda senfama vilaĝo nomita Mondo. En la tempo kiam okazis nia rakontaĵo, vivis en ĝi viro de nedifinebla aĝo, de vizaĝo nek bela, nek malbela, de staturato nek alta, nek malalta, kies najbaroj nomis lin Homaro.

La ĉirkaŭaĵoj de la vilaĝo ne povis esti plej loĝaj. Multfoje sentis Homaro la deziron viziti la urbetojn tie apudkuŝantajn, promeni tra la proksimaj floroplenaj ĝardenoj, vagadi en la densa mistera arbaro, trafi la bordon de la maro, tiu purblua vastega akvaro, kiu senĉese plaŭdetadis tiel lule, tiel harmonie...

Sed tio estis al li neebla. Por iri en kiun ajn direkton, li devis trapasi terspacon tre malglatan, kiu plej akre vundis liajn nudajn piedojn. Oni devas atenti, ke en tiu tempo ne ekzistis ankoraŭ botoj, nek ŝuoj.

La bedaŭrinda Homaro kredis sin tre malfeliĉa, ĉar li ne povis trafi tiujn okulvideblajn belajojn, nek komuniki sin kun la loĝantoj de la apudaj urbetoj.

Unu someran tagon, kiam li malgaje sidis ĉe la pordo de sia domo, kun la okuloj teren fiksitaĵ, li sentis subite, ke oni lin frapas sur la dorso. Li turnis sin rapide kaj ekvidis antaŭ si nealtan sorĉiston, kun grizhara barbeto kaj oraj okulvitroj, kiu ridetis al li afable kaj tenis en la manoj paron da novaj, belaj botoj.

Homaro ekmiris pri la apero. La sorĉisto diris per milda voĉo:

—Ne timu, Homaro, mi ja scias, ke vi varme deziras viziti la proksimajn urbetojn, promenadi tra la ĝardenoj, vagadi en la arbaro, ektuŝi la maron. Vi tamen ne povas, ĉar la malglateco de la tero disŝiras viajn nudajn piedojn. Prenu tiujn ĉi botojn: enŝovu en ilin la piedojn kaj vi povos traŭri kien ajn sensufere kaj senlace.

Homaro nur maltemis diri:

—Dankon, plej koran dankon!

La sorĉisto aldonis:

—Vi ne devas min danki. Tiuj ĉi botoj estas via propraĵo: mi ilin faris nur por helpi vin. Uzu ilin, estu feliĉa kaj Dio vin benu!

Dirinte tiujn ĉi vortojn, li subite malaperis, lasante Homaron en granda konfuziĝo.

Homaro esplorpalsis la botojn, provis enŝovi en

ilin la piedojn kaj li sukcesis. Tiam li komencis iradi ĉiudirekten kaj kun senlima ĝojo li konstatis, ke la sorĉisto ne trompis lin, ĉar kun la botoj li paŝadis tiel senĝene, tiel sensufere sur la malglata tero, kvazaŭ li nur iradus sur aero.

Kiel priskribi la feliĉon de nia Homaro kun botoj! Li vizitis la urbetojn, komunikigis kun aliaj landanoj antaŭe nekonitaj, promenadis tra la ĝardenoj, vagiris en la densa arbaro, ŝipiris sur la maro kaj lia ĝojo debordiĝis el lia koro. Kaj tiel forpasis dudek jaroj, kiuj ŝajnis tiel rapidaj, kiel tagoj.

Unu matenon li estis enŝovinta al si la botojn, preta fari promenadon, kiam najbaro lia, nomata Reformo, alpaŝis al li kaj diris:

—Kiel malsaĝa, kiel naŭva vi estas, Homaro! Porti tiajn malbonajn kaj malbelajn botojn! Ĉu vi ne vidas, ke ili ne havas kalkanumojn?

—Por kio do, mi bezonas kalkanumojn? Kun miaj botoj mi iradas plej senĝene.

—Jes, sed kalkanumoj tre taŭgas al vi; kun ili vi paŝus pli rapide, pli sendanĝere.

—Ĉu vere?

—Jes, mia kara.

Kaj eltirante du ŝtipojn nomitajn "Internacieco", li diris al Homaro:

—Lasu, ke mi alnajlu tiujn ĉi kalkanumojn al viaj botoj kaj vi ja ne pentos.

Homaro lasis fari tion kaj depost tiu tago li uzis la botojn kun kalkanumoj. Tuj li konstatis, ke la kalkanumoj nur igas la paŝadon pli ĝena, pli malfacila, sed li ne kuraĝis ĉi tion konfesi, el la timo, ke oni lin nomu malsaĝa kaj naŭva.

Alian tagon la najbaro parolis al li jene:

—Kiel malsprita vi estas, Homaro! Viaj botoj ne havas pinton en la antaŭparto: ili, do, estas tre malbelaj: lasu ke mi pintigu ilin kaj vi paŝados pli libere kaj facile.

Kaj li eltiris ilon el la poŝo nomatan "Perfekteco" kaj sen kontraŭstaro de Homaro li tre pintigis liajn botojn.

Kiam la malfeliĉa Homaro reenŝovis al si la botojn, li tuj rimarkis, ke ili tre premas kaj doloras la piedofingrojn, sed li silentis, timante ke tio nur estas trompoŝajno kaj oni lin nomos idioto.

Kaj tiamaniere iom post iom Homaro lasis fari ĉiaspacajn reformojn en la botoj. El sia unua ĉarma simpleco ili pasis al tia senarta komplikeco, ke ili jam estas nerekonablaj. Krom tio ili premis kaj doloris tiel multe la piedojn, ke li jam ne povas iradi, sentante kun la botoj pli da doloro, al sen ili.

Kaj denove li venis al tia terura komenca situacio, kiam li ne povis foriri de sia domo. Kaj nun li estis pli malĝoja, ĉar neniam oni sentas pli akre la malfeliĉon, ol kiam oni rememoras la ĝuitan feliĉon.

Unu tagon, kiam li ploris senkonsole ĉe la pordo de sia domo, li subite rememoris pri la malavara, afabla sorĉisto, kiu donadis al li la botojn, per kiuj li iradis tiel prospere dum la dudek unuaj jaroj. Dezirante ĝui denove la perditan feliĉon, Homaro vokis larmovoĉe la sorĉiston, kiu tuj sin prezentis al la ploranto.

—Kion vi volas? demandis seke la sorĉisto, en kies vizaĝo jam ne aperis la antaŭa afabla rideto.

—Mi petas, ke vi donu al mi aliajn botojn; mi ne povas plu iradi...

Aŭdinte tiujn ĉi vortojn, la sorĉisto respondis malmilde:

—Mi tre bedaŭras, sed mi ne povas helpi al vi. Tutvivan laboradon mi faris por konstrui tiajn simplajn botojn, kiujn mi donacis al vi nur por vin feliĉigi. Vi ilin uzis dum 20 jaroj plej prospere. Kion vi povis plideziri? Kaj anstataŭ danki min pro tia ofero, vi malŝatante miajn botojn, permesis, ke oni ilin reformu, ke oni ilin malbonigu. Nu, ĉar vi estis tiel malsaĝa, restu sen botoj, ĉiam iradu nudpiede, vi ne estas inda je protekto kaj feliĉo!

Kaj li foriris, lasante Homaron en plej premanta korĉagreno.

* * *

Kiam oni posedas plej taŭgan ilon, kiu plej bona montriĝis dum longa, sukcesa provado, la plej elementa saĝeco konsilas ĝin ame konservi kaj ĉiam gardi. Kiu, kontraŭe, fiere kaj malprudente, sin dediĉas ĝin reformi, tiu perdas la tempon, detruas la bonegan ilon kaj fariĝas neinda ĝin havi!

Originale verkis

VICENTE INGLADA.

Rimarko.—Tiu ĉi fablo estis verkita antaŭ 25 jaroj, kiam la propagando de Ido, tiom malutilis al Esperanto. Laŭ nia opinio la fablo ne perdis sian aktualecon, ĉar ni devas nun gardi Esperanton de kelkaj reformistoj, kiuj emas komplikigi ĝin, ekz. preferante "Hispanio" anstataŭ "Hispanujo", forigante la uzon de prefikso "mal", kreante multenombrajn superflujajn radikojn, k. c.

LA KASTELO DE BELLVER

(BALEARINSULOJ)

En la Balearaj Insuloj, je malmulta distanco de la ĉefurbo (Palmo de Majorko) staras la kastelo de Bellver.

Jakobo II-a ĉe la komenciĝo de la XIV-a jarcento konstruigis tiun ĉi palacfortikaĵon, en kies konstruado laboris Petro Salvá kaj la pentristo Francisko Caballer.

Ĝi aspektas tute malsame, kiel la ceteraj hispanaj kasteloj, ĉar ĝi estas la nura ekzemplero ekzistanta, perfekte ronda laŭ horizontala konturo kaj havanta grandegan turon al ĝi ne kunigitan, kiu estas ĉe la antaŭaĵo kaj defendas la enirejon komunikigitan kun la cetera parto de la kastelo per ponto. Ĉe la ekstremoj de la laŭlonga kaj laŭlarĝa diametroj de la ĉefa korpo de la konstruaĵo estas po unu duonronda turo kaj ĉe la diagonaloj, bastionoj.

La korton ĉirkaŭas du rondaj galerioj; tiu malsupra, el arkadaro kun duonrondaj arkadoj kaj tiu supra, el ogivaj arkadoj.

Ĝi estis loĝejo de la Majorkaj reĝoj; en la XVI-a jarcento ĝin konkeris la komunumaj ribelantoj; en la jaro 1802 estis en ĝi malliberigata Melĉoro Gaspar de Jovellanos; dekkvin jarojn pli malfrue estis pafmortigata tie la generalo Lacy, estro de malsukcesinta ribelo.

Trad. BIENVENIDO SERRANO.

Morata de Jalón.

LA AŬSTRALIA INDIĜENO

Kredeble, kiel multaj asertas, la indiĝenoj de Aŭstralio havas tre malaltan vivnivelon, sed malgraŭ tio ilia riĉeco prave ŝajnos al ili granda. Loĝante plejgrandparte apud marĉoj kaj konstruante siajn loĝejojn proksime de arboj, ili havas manĝaĵojn el marĉoj kaj arbaroj samtempe. La marĉoj liveras al ili manĝeblajn radikojn, kolektitajn de la virinoj; angilojn, lancpikitajn de la viroj; anasojn, ĉu ŝtonmortigitajn, ĉu kaptitajn per gluajo ŝmirita sur ĉirkaŭkreskintajn arbojn, kaj fine, alispecajn akvobirdojn. La arbaroj havigas al ili makopojn, didelfojn, serpentojn, larvojn k. t. p.

La arbaroj ankaŭ liveras al la indiĝenoj belajn peltojn ĉefe makoprajn, kiuj vintre estas uzataj, kiel molaj, flekseblaj kovriloj. La peltoj, kiujn ili moligas per multa frotado, estas kunkudrataj de la virinoj per bestaj tendenoj, kvazaŭ ili estus fade-no, kaj per kudrilo konsistanta el osteto de posta kruro de makropo. Se ili ne deziras alkuŝiĝi frue, ne uzas tuj la peltkovrilojn, sed ekbruliginte du malgrandajn fajrojn, ili kaŭras inter ambaŭ por ankaŭ varmigi sian dorson.

Kiel valizon, la enlandano uzas lignan trogeton portatan sur la kapo aŭ transpende de kokso. En ĝin ili enmetas jen manĝaĵojn jen eĉ infaneton. Alia speco de portilo estas sako teksita per jun-koj. Ĉi tiu lasta entenas inter aliaj objektoj la hejmajn amuletojn por maltrafiĝi malbonajn spiritojn.

Niaj filoj de la naturo povas boligi nenion, ĉar ili ne konas la potfaradan arton; sed iliajn rostitajn fiŝojn, viandon kaj radikojn multaj ja ne malŝatus. Por rosti ili enterigas, por ke ĝi enrestu dum daŭro de nokto, la kuirotajon en treege varmigitan elfosajon. Iom strangan guston helpas doni la junkoj, per kiuj ili ĉirkaŭas la kuirpecon.

Multaj, multaj estas la ruzoj de la indiĝenoj por fari sian vivon agrabla; sed eble la esperantistoj preferas legi ion pri iliaj lingvoj: Ĉi tiuj ja estas multaj kaj lerneblaj nur per praktiko, do ni por fini montras specimenon en la dialekto de la Arandaj indiĝenoj, kiu eble interesos.

"Kara nunakara alkiela
Retna unkuanga atknaltareerekana
Smaratjua unkuanga pitiekana
Antjabma untkuangana alberkuekana
Alkiela ngera lakina alala luta

... ..

Tre malofte la indiĝenoj vizitas la urbojn kaj eĉ en la vilaĝojn kamparajn ne ofte aperas. Ili loĝas plejgrandparte en la centra regiono de la kontinento kaj ĉe la norda kaj nordokcidenta marbordoj kaj ilia preciza nombro estas ja nekonata.

DORA DRUMMOND.

Aŭstralio.

LA ĜIJARA ĜENERALKUNSIDO DE "FRATECO"

La 27-an de Januaro en salono de la Komerca Klubo je la 10-a kaj duono matene okazis la Ordinara Ĝeneralkunsido de nia Societo sub la prezido de ĝia Honora Prezidanto Sro. Edmanuelo Maynar.

La Sro. Sekretario ĝin komencis, legante la akton de la lasta ĝeneralkunsido, kiun oni aprobis.

La sama sinjoro legis la raporton rilatantan la societatan vivon dum la pasinta jaro. En tiu raporto oni sciigas pri la laborado de la Komitato dum tiu tempo kaj pri skribaĵo de Sro. Emilio Bruquetas, per kiu li rezignas sian Prezidantan postenon kaŭze de sia loĝado for el Zaragozo; ankaŭ en ĝi oni dankas la gegvidintojn je kursoj: Finoj Bueno kaj Calvete kaj Sroj. Salas, Etayo, Vallojera, Orós, Artigas kaj Gascón same, kiel Sron. Maynar pro tiu, kiun li gvidis en la Komerca Klubo; oni raportis poste pri la aĉetitaj libroj por nia Biblioteko, pri la aliĝado kaj malaliĝado de anoj kaj fine, pri la societaj enspezoj kaj elspezoj, kiuj estas jene: Saldo en 31-12-1933=12780'31 pesetoj; enspezoj dum 1934=6745'97; elspezoj=16678'35; kasa enhavo=2847'93.

Oni aprobis la raporton kaj konsentis dankatesten por la Komitato.

Ĉar neniu volis uzi la parolrajton dum la kunsida parto destinita por "petoj kaj demandoj", oni komencis la baloton por anstataŭi la ĉesantajn komitatanojn kaj rezultis la jena komitato:

Prezidanto, Sro. Ramón de Salas.
Viceprezidanto, Fino. Victorina Bueno.
Sekretario, Sro. José Martínez.
Vicsekretario, Sro. Jesús Puértolas.
Kasisto, Sro. José Larruga.
Vickasisto, (Vakanta).
Kalkulisto, Sro. Lorenzo Til.
Vickalkulisto, Sro. Jesús Murillo.
1-a Voĉkomitatano, Sro. José Orós.
2-a " Sro. Miguel Fillat.
3-a " Sro. Emilio Artigas.
4-a " Sro. Feliciano Turrión.

SPRITAĴOJ

En ekzameno je fiziko.

Profesoro—Atentu multe: kio okazos, se mi premos la butonon de la elektra sonorilo?

La ekzamenato—Ke tuj aperos la pedelo.

* * *

Kuracisto kaj drimkemulo.

—Trinku ĉi tiun kuracilon, imagante, ke ĝi estas vino.

—Nu, ĉu ne efikas same trinki vinon kaj imagi, ke ĝi estas kuracilo?

* * *

Sercemulo.

—Ĉu vi estas italo?—Oui.

—Ha! do, ĉu vi estas franco?—Ja.

—Nu, ĉu vi mokas min?—Jes.

* * *

En lernejo.

—Kial vi skribas "pisto" per du literoj "l"?

—Por ke oni pli facile komprenu, ke ĝi estas dupaftuba pistolo.

* * *

Patro kaj fileto.

—Jen tiu maljuna sinjoro: Li alvenis en nian urbon piedvestite per ĉifoniĝintaj botoj kaj nun li havas du milionojn.

—Nu, por kio taŭgas al li du milionoj da ĉifoniĝintaj botoj?

* * *

En laktovendejo.

—Ĉu vi jam pretigis la disvendotan lakton?

—Ne, ankoraŭ mi ne aldonis la akvon.

* * *

Aŭskultantino je gazetlegado.

"En Atlantiko dronis ŝipo havanta mil tunojn kaj potencon de dumil ĉevaloj".

Kompatemulino ekdiras:

—Malfeliĉaj bestoj! Certe ili ĉiuj dronis.

ANEKDOTOJ

Oni demandis Voltaire'on kiamaniere li povis skribi tiom multe da verkoj. "Ĉar mi mallonge restis en Parizo" li respondis, kaj tamen li konsilis al ĉiuj poetoj, ke ili verku versaĵojn nur en Parizo.

* * *

Negocisto en la momento subskribi ateston pri baptiĝo de unu sia filineto, tute malatente subskribis: *Antonio Pérez kaj Kompanio*. Tion rimarkante ĉiuj alestantoj, ĥore ekridegis kaj la malfeliĉa komercisto tuj komprenis sian distraĵon.

* * *

Marivaux neniam respondis al mallaŭdoj faritaj pri liaj verkoj. Li klarigadis sian ĉiaman silenton dirante: "Mi multe amas mian ripozon kaj ne volas interrompi tiun de miaj mallaŭdintoj".

* * *

"Mia filo!... La armeo!... Bessaix..." jen la lastaj vortoj de Napoleono I, kiu kredeble sonĝis en tiu solena momento pri sia brilega venko en Marengo.

* * *

Iu kuracisto diris en salono: "Mia amiko malsaniĝis, mi lin kuracis; li mortis, mi lin dissekcis".

(Thomas).

* * *

Pastro Malebranche, premita de siaj amikoj, por ke li respondu al la Trévoux'aj gazetistoj, kiuj obstinis lin kritiki: "Mi neniam disputas, diris li al ili, kun personoj, kiuj verkas unu libron ĉiusemajne aŭ ĉiumonate".

(De La Place. *Interesaj pecoj*).

* * *

Mallerta arkpafisto estis preta tuj pafi al celtabulo. Diogeno alkuris meti sin post ĝin kaj diris: "Jen kie oni estas plej sendanĝere".

(Diogeno el Laerto).

* * *

Karolo IX demandis poeton Daurat, kiel li estis pripensanta por edziĝi tiel maljuna kun juna knabino. "Reĝa Moŝto, respondis li, tio estas poeta libereto".

(Talleyment des Réaux).

* * *

"Diru al ni, Diogeno, kiam oni devas edziĝi?—Dum juneco estas tro frue; dum maljuneco—tro malfrue".

(Diogeno el Laerto).

Tradukis

VICENTE INGLADA.